



Universala Esperanto-Asocio. Jen serio de gvidiloj pri plej diversaj funkcioj kaj aspektoj de la asocia vivo.

Historio: La dokumento naskiĝis en februaro 2016, vidis ĝin ĉiu estrarano kun koment-invito. La Ĝenerala Direktoro faris intervenojn meze de 2016. Ĝis feb. 2018 ĝi neniam aperis publike.

Bazaj informoj

Statutaj postuloj

La estraro de UEA kutime havas sep membrojn, sed ajna nombro inter 5 kaj 9 eblas; tuj antaŭ ĉiu elekto, la nombro estas fiksita de la Komitato. La mandato estas trijara, la elektoj okazas en la komitatkunsidoj en la Universala Kongreso.

Via rolo en la movado

Atentu ke ekde nun vi ne nur estas 'taksata' en la movado kiel simpla homo, sed ankaŭ kiel estrarano de UEA - tial atentu ke viaj agoj, diroj laŭeble helpu plibonigi la bildon pri UEA (kaj kiam vi reprezentas la Asocion aŭ la Estraron, evitu kazojn de samtempa reprezentado de UEA kaj ia ajn privata entrepreno. Tio estas kontraŭ la reguloj pri bona regado, kiuj en Nederlando estas strikte sekvataj.)

Kunsidoj fizikaj

La ĉefa fizika kunsido okazas kutime en aprilo en la CO tra tri tagoj; la Asocio zorgas pri la surlokaj kaj vojaĝaj kostoj, kondiĉe je elekto de ekonomiaj vojaĝebloj. Estraranoj kutimas kunsidi dum la UK (sed ĉefe pri kongresaj devoj) kaj en unu/du tagoj post UK – por tiu vojaĝo kaj restado la Asocio kutime ne pagas. Kaze de nova estraro, ege dezirindas orientiga kunsido iam inter septembro kaj decembro post la elektoj, eĉ se povas partopreni nur kelkaj estraranoj.

Kunsidoj retaj

Tiuj principe okazas, momente per skajpo, ĉiun duan semajnon. La teknika kvalito iom varias, sed la kontaktoj povas bone funkcii. Protokoloj limigas sin al notado de decidoj kaj havantoj de taskoj, ne prinoto de ĉiu diraĵo. Do, estas labora dokumento pli ol historia. Aldone, foje okazas kunsidoj kun la Konsilio, kun kernaj oficuloj en TEJO kaj aliaj grupoj. Do, por estrarano la tempo-postulo signife grandas.

Decidofarado

Normale la politikaj decidoj estas komitataj, kaj la plenumaj estas estraraj, do de la tuta Estraro de UEA. Komprenible en multaj kazoj la estrarano respondeca pri iu agadkampo faras proponon tiurilatan, kaj la cetero de la estraro simple aprobas ĝin (ofte per silentkonsento).

Ene de UEA decidado okazas kutime malpli rapide ol en TEJO, ILEI kaj en landaj aŭ fakaj asocioj. La publika percepto estas, ke UEA estas burokrata kaj peza kaj malrapide venas al decidoj. Tio ne ĉiam veras, sed en la nuna komputika mondo la vivritmo rapidiĝas kaj oni atendas de UEA pli suplan atingon de decidoj kaj plenumon de rezultoj. Grava defio por la Estraro estas ŝanĝi la asocian kulturon por akceli tiun transformon.

Gravaj decidoj

- Ĉiujare la estraro devas decidi pri la urbo kaj datoj de la Universala Kongreso post du jaroj. Tio okazas sekve de esploroj pretigitaj de la Centra Oficejo surbaze de vizitoj de KKS al

kandidaturboj kaj propraj esploroj. Foje tiuj decidoj okazas dum la fizika aprila kunsido en la Centra Oficejo, foje poste, sed ĉiukaze antaŭ aŭ dum la UK.

- La estraro elektas la redaktoron de la revuo *Esperanto*, kiam tio necesas. La estraro elektas novan Ĝeneralan Direktoron de UEA, kiam tio necesas.
- La Estraro decidas pri la ricevantoj de Diplomoj pri Elstara (Arta) Agado.
- La Estraro faras rekomendojn al la Komitato pri nomumo de Honoraj Membroj kaj membroj de la Honora Patrona Komitato.

Ĉefaj taskoj

1. Unua tasko – labori! Ideoj abundas.
2. Koni, akcepti kaj realigi la enhavon de la Strategia Plano
3. Prizorgi teame la realigon de la plano, kune kun financa planado
4. Vidigi la Asocion, ĉerpi spertojn
5. Kompreni la ĉiujarajn estrarajn devojn
6. Kompreni ekstrajn devojn en la lastaj monatoj de la mandato
7. Respekti komune konsentitajn limdatojn
8. Sisteme proponi laboron al konsilianoj, komisionoj, komitatanoj k.a.

1. Unua tasko – labori! Ideoj abundas.

Ni dronas en 'bonaj' ideoj, eĉ nur kvarono el ili vere estas bonaj. En nia nuna (ŝanĝenda) situacio, la unuaranga kaj ĉefa tasko por estrarano estas laboregi por plenumi la plej gravajn el la prioritigitaj projektoj proponitaj de la Strategia Plano kaj de aliaj fontoj.

2. Koni, akcepti kaj realigi la enhavon de la Strategia Plano

Gravas, ke estraranoj konu la aktualan Strategian Planon kaj laboru kun kolegoj por difini pli konkretajn projektojn kaj agadojn, kiuj plenumos planpartojn, en la tereno de sia kompetento. Estraranoj devas povi efike ŝalti inter perspektivlongoj. Lumomente gravas vidi la dek-jaran vizion, tuj poste plenumi devojn en monata skalo, respekti limdatojn de la sekva semajno, kaj esti ĉiam preta problemsolvi de minuto al minuto.

3. Prizorgi teame la realigon de la plano, kune kun financa planado

La Strategia Plano atingas sian valoron, nur se ĝiaj grandaj celoj estas konkretigitaj al veraj projektoj, kun plenumantoj kaj temposkemoj. Nepra estas la samtempa idea planado kune kun financa planado. Planado sen financa planado ne havas sencon. La estraranoj devas kune akcepti buĝeton pri la Movada Evoluigo (ME), aldone al la statuta devo akcepti la ĝeneralan buĝeton. Kiam tiu buĝeto por ME estas akceptita, estas la tasko de estraranoj zorgi, ke la monsumoj estu uzataj por la anoncigitaj celoj. UEA en financaj aferoj ne povas esti 'lastmomentisma' organizo. Kiu volas ricevi subtenon, devas submeti siajn proponojn en la ĝusta momento – kaj la Asocio devas konigi al la komunumo, kiam estas tiu ĝusta momento. Vidu pli pri buĝetado sube.

4. Vidigi la Asocion, ĉerpi spertojn

Estraranoj kaptu ĉiun eblon vidigi la asocion, indas saluti kaj aktive prezenti la asocion en landaj kaj fakaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj. Unuavice la estrarano kun respondeco pri kontaktoj kun Landaj Asocioj havas la devon viziti multajn landojn, sed ĉiuj estraranoj povas kunlabori en tiu vidiga laboro. Ĉe vizito al la lando, la tasko estas ne nur informi kaj gvidi, sed ankaŭ aŭskulti kaj lerni. Gravus, ke UEA eksciu senpere la opiniojn kaj taksojn de la komunumanoj pri la funkciado de la Asocio kaj la movado. Gravus kompreni la atingojn kaj obstaklojn de la loka movado por povi eluzi la pozitivaĵojn kaj kunsolvi la efikojn de obstakloj. Tiucele, FLAM-analiza ekzerco povas tre helpi por kristaligi la pensadon kaj en iom sistemeca maniero prezenti la situacion, cele al solvoj kaj taktiikoj.

5. Kompreni la ĉiujarajn estrarajn devojn

Pretigi teamece jarraporton (jan-mar) pri la ĵus finita jaro, laŭ notoj faritaj jarfine. Preciza verkplano proponas strukturon kaj temojn kaj celajn nombrojn da vortoj. Pretigendas du versioj, la oficiala

estas tre mallonga, aperas en la revuo *Esperanto*, kaj devas esti regulare tradukita nederlandlingven. Pli plena raporto povas raporti pli amplekse – tio nun aperas kun fotoj kaj ilustraĵoj. La aprila kunsido traktas la raportojn, post finpoluro la oficiala raporto iras al la redaktoro.

Pretigi buĝeton por Movada Evoluigo (ME) por la sekva jaro (feb.-apr.) helpe se iel eble de rezultoj – provizoraj aŭ definitivaj) pri ME en la antaŭa jaro. La buĝeton por ME la Estraro traktas en la aprila kunsido, kune kun la ĝenerala buĝeto kaj rezultoj el la antaŭa jaro. La detalo de la buĝeto ME iras al la Komitato informe (ja komencis temi pri signifetaj sumoj), sed ili ne devas specife voĉdoni pri ĝi. Eniras la ĝeneralan buĝeton nur la finsumo por ME kaj ĝiaj kvar ĉefaj rubrikoj (Konsciigo, Kapabligo, Komunumo, Kunordigo). Escepto estas en elektojaro, kiam la detalaj subsumoj estas nur rekomendo de la malnova estraro al la nova, kiu finfiksus siajn planojn kaj prioritatojn ene de tri monatoj post la elekto.

6. Kompreni ekstrajn devojn en la lastaj monatoj de la mandato

- Pretigi solidan bazon por la jarraporto pri la kuranta jaro, rilate al la monatoj jan.-julio. Tiel la nova Estraro ne estos kondamnita raporti pri la ses monatoj pri kiuj ili ne havis mandaton.
- Aprobi la buĝeton por la sekva jaro, kiu inkluzivas la sumon por Movada Evoluigo (ME) kaj la kvar subsumojn. Bedaŭrinde, tio estas neevitebla devo – praktika sekvo estas, ke la sekva Estraro devas vivi pere de buĝetoj, kiujn ĝi mem ne helpis krei tra 18 el ĝiaj 36 monatoj. Gravus do antaŭpensi, kiom eble, la bezonojn kaj planojn de la estonta (neekzistanta) Estraro. Perspektive tiu baza struktura difekto estas forigebla per pli rapida kaj fleksebla funkciigo de la Komitato, tiel ke la nova Estraro finmodifu la proponitan buĝeton kiun ĝi heredis, kaj antaŭmetu ĝin per modernaj komunik-rimedo al la Komitato en septembro aŭ oktobro kun simila akceptiga meĥanismo.
- Kiom eble fortigi la aron da gvidiloj kaj orientadaj dokumentoj, por ke la nova Estraro estu bonvenigita kaj povu kiel eble plej rapide ekagi efike, sen la bezono malkovri bezonatajn informojn hazarde kaj stumbe.

7. Respekti komune konsentitajn limdatojn

Gravas fiksi ĉefajn limdatojn, ekzemple dufoje jare por la sekvaj ses monatoj, komune akcepti ilin kaj rigore respekti ilin. Solidareco inter la estraranoj dependas de la disciplino de ĉiu. Dum kunsidoj povos leviĝi pli urĝaj malrutinaj taskoj. La kunsidoj nepre fiksus plenumon por la tasko kune kun livera limdato. Ĉio ĉi en la kunteksto de provo rapidigi la decidadon kaj taskplenumon en la asocio.

8. Delegado

La Estraro sisteme proponu laboron al konsilianoj, komisionoj, komitatanoj k.a. La estraranoj krevos, se ili provas esti la solaj plenumantoj de la Movada Evoluigo (ME). Delegado kostas tempon, sed necesas. La tempokosto okazas por trapensi kaj difini la taskon komence, kaj por la plusekvado kaj finkontrolo pri rezultoj. Dum la Asocio provas pene konstrui reton de honorariaj helpantoj aŭ volontuloj aŭ eĉ ia oficejo por ME (en aŭ ekster CO), la Estraro devas uzi la fortojn de konsilianoj, komisionoj, komitatanoj.

Konsilio: Sperto ĉe konsilio montras, ke sen petoj por plenumi specifajn taskojn aŭ projektojn, ili malmulton faros; ili estas ja talentaj homoj, sed kun aliaj intereso kaj devoj, en la movado kaj ekster ĝi.

Komitato: Ĝis nun ni apenaŭ proponis taskon al unuopa komitatano, nur plendas pri ĝia neadekvata funkciado. Indas provi foje taski difinitan komitatanon pri io en ties kompetento.

Komisionoj: Iuj funkcias, iuj apenaŭ, iuj plene dormas. Kaj ni eĉ ne scias kiuj funkcias, kiuj ne. Unu estrarano (aŭ konsiliano!) devas havi la taskon regule kontakti la komisionojn por kompili superrigardon pri ilia stato. Gravus scii, ĉu ĉiuj komisionoj havas celaron kaj laborplanon. La estraro kreu modelan laborplanon por komisiono. Nova Estraro devas difini la membrecon de komisionoj ene de la unuaj monatoj de la nova mandato. Kelkaj komisionoj apartenas al la kompetento de la Komitato, aliaj de la Estraro. La plena listo kaj la rega instanco estas trovebla en la asocia retejo.

Universala Kongreso

La kutimaj datoj estas de sabato al sabato en la lasta kompleta semajno de julio. Oni devias de tio nur kaze de tre evidenta bezono. La Estraro fiksas la kongresan temon, kaj la temgvidantojn; akceptas la proponon de la prelegontoj por la Internacia Kongresa Universitato (IKU). Tiuj kutime alvenas antaŭ la aprila kunsido, kaj estas decideblaj rete/skajpe. La estraro ricevu komence de UK koncizan orientiĝan gvidon de KKS aŭ LKK-ano pri la kongresejo, kie troveblu adekvata laborĉambreto.

Kontinentaj Kongresoj

Tiuj ne rajtas okazi en jaro, kiam la Universala Kongreso okazas en la koncerna kontinento. La Estraro fiksas la lokon kaj daton de tiuj kongresoj. Restas celo, ke UEA pli proksime ligu sin kun tiuj kongresoj cele al "Universaliraj Kongresoj". Tio bezonos apartan laborgrupon por proponi strategion. Klare UEA havas limigitajn financajn kaj laborajn fortojn por tiuj kongresoj, tamen ni provu kiom eble, ke partoprenantoj sentu, ke ili venis al 'mini-UK' kaj ke la kongreso klare okazis ene de la kadro de UEA. Momente la kutima ofteco por kontinentaj kongresoj estas en ĉiu tria jaro – temas pri Azia, Afrika (AKE) kaj Amerika (TAKE). Ekzistas listo de ĉiuj okazintaj Kontinentaj Kongresoj.

Buĝetoj

La Estraro vidas en la aprila kunsido finkalkulon pri la antaŭa jaro, la buĝeton por la kuranta jaro (jam akceptita) plus buĝeton por la venonta jaro, kiun ĝi (kaj la Komitato poste) devas akcepti. Ene de tiu buĝeto aperas unu rubriko pri Movada Evoluigo, kun nur kvar subrubrikoj (Konsciigo – do eksteraj rilatoj kaj aleksteraj informado), Kapabligo, Komunumo, Kunordigo. La Komitato devas akcepti nur tiujn kvar sumojn plus la finsumon. Sed la Estraro devas pretigi pli detalan buĝeton por gvidi la laborojn, kaj esti prezentita al la Komitato informcele. Kiam la Komitato akceptis la tutan buĝeton en julio por la sekva jaro, tio devas validi. Sed la detaloj por ME estos afero por la Estraro, kaj ĝi rajtas modifi ilin laŭ novaj cirkonstancoj. Tre gravas ligi firme la idean planadon kun la financa planado.

Fine

Ĉi tiu gvidilo estas dinamika dokumento. Ĝin ni devas aktualigi de tempo al tempo. Do, bonvenas komentoj pri malĝustaj aŭ nekompletaj informoj aŭ notindaj novaj temoj.

SMG, v1 Katmanduo, oficejo de Nespa, Katmanduo, la 10an de marto 2016.
V2 18 julio 2016, Bp, kun aldonoj de V. Poór.
V3. Nur kosmetikaj modifetoj SMG. 13 feb 2018.
V4 Lingva kontrolo RM traktita, 15 feb 2018.